# *E*speranto-*N*umismatika *A*socio




**_E_speranta _N_umismatiko** 2018 **Jarkolekto 5 - Numero 4**










# *E N H A V O T A B E L O*

## de oktobro 2018

Titolpaĝo …………………………………………………..………….. 1

Enhavotabelo ………………………………………………………… 2

De ni por … ni !…………………………………………………... 3

Moneroj & medaloj …………………………………………….. 4

*UMEA – renkontiĝo en Pasvalys 1989*

*68a Universala Kongreso Budapeŝto 1983*

*Radio Polonia 100 000*

*L.L. Zamenhof 1859-1959*

*Honora medalo por profesoro d-ro Ivo Lapenna*

Spikumaĵoj & suplementoj ……………....……...………….……..….. 12

Aspektoj de numismatiko: Kalkulĵetonoj kaj samspecaĵoj …………... 13

Medalistoj: 14 Riccardo Rossi (1911 – 1983) ………………….……..… 15

Historiaj aspektoj: La babela turo en la (esperanta) kulturo ………… 16

Por spuremuloj! …………………………………………..………….. 19

Terminaro: Alfabeta listo (15) ……………………………...…………. 20

El la gazetaro ………………………...……………………….………. 21

Retpoŝto ………………………………………………………..….. 22

Anoncoj & eventoj ……………………..……………….....….……...… 33

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts bert.boon@skynet.be
Provlegado: Jozefo Horvath www.esperanto.es/biblioteko
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon! www.kolektado.esperanto.cc
Finredaktoro: Bert Boon

# *DE NI POR ... NI!*



La standoj de ELF-Arek kaj ENA

La partopreno de ENA en la 103a UK en Lisbono estis surprize fruktedona. Dum la tradicia "Movada Foiro" granda amaso de UK-partoprenantoj en tro malgranda salono kun tro malmulte da tabloj interpremiĝis por ricevi informojn pri pli ol 120 fakgrupoj. Flanke je flanko la standoj de ELF-Arek kaj ENA regalis dum pli ol du horoj senpaŭze la scivolemulojn per klarigoj, broŝuroj kaj eĉ … dolĉaĵoj. Tio ebligis surloke kaj ebligos dum la sekvontaj tagoj varbi novajn membrojn, renkonti fine kelkajn aliĝintojn el diversaj landoj, interparoli pri novaj projektoj dum la venontaj Universalaj Kongresoj, ktp, ktp.




Daniel Gonçalves

ENA sukcesis varbi dum unu semajno ne malpli ol 13 novajn membrojn. Inter ili la centan membron, Daniel Gonçalves, samtempe la unuan membron el Portugalio. Kia koincido! La aliaj novuloj apartenas al Argentino, Germanio, Pollando, Litovio, Latvio, Ukrainio, Ĉinio, Japanio, Nepalo kaj Senegalo.

Gravis ankaŭ la kontaktoj kun organizontoj (Loka Kongresa Komitato) de la 104a UK en Finnlando (Lahtio 2019) kaj de la 105a UK en Kanado (Montrealo 2020). Ambaŭ reagis entuziasme kaj petis detalajn informojn kaj strategion por eldoni UK-medalon. Dume la redakcio jam sendis al ili proponon kun diversaj ideoj kaj rekomendoj.

Hodiaŭ vi ricevas la lastan numeron de la kvina jarkolekto. Jen do la unua "jarkvino" en la historio de "Esperanta Numismatiko". Ni ne scias, kaj tial ni ŝatus ricevi de vi reagojn, proponojn, ideojn, ĉu la aspekto kaj la enhavo de la revuo vere plaĉas al vi ĉiuj. Vi, karaj legantoj, decidu do, ĉu ni daŭrigu sekvi la saman vojon aŭ prefere alian.

Ĉiel, en ĉi numero vi retrovos la konatajn rubrikojn, kun "novaj" numismatikaĵoj en "Moneroj & Medaloj", kontribuaĵoj pri terminaro, pri numismatikaj kaj historiaj aspektoj, tradukitan gazetaran artikolon, biografion de medalisto - artisto, anoncon, raporton pri la UK 2018 kaj kompreneble ankaŭ superrigardon de korespondado inter ENA kaj ĝiaj membroj.

Kiel kutime, ni deziras al vi tre agrablan kaj mense pliriĉigan legadon, kiu inspiru vin al kontakto kun la redakcio. Dankon!

Bert

## *M O N E R O J& M E D A L O J*

### Tipo A 1- Esperanto-medaloj

UMEA - renkontiĝo en Pasvalys 1989




| | |
|---|---|
| Lando: Litovio | Kvanto: nekonata |
| Substanco: argilo | Pezo: nekonata |
| Mezuroj: 93 x 85 mm | Medalisto: nekonata |
| Jaro: 1989 | Diko: nekonata |

### *Averso:*

Maldekstre: kvinpinta stelo super terglobo kun serpento (medicinista simbolo) kaj sub tio skribo: "UMEA".

Dekstre: "RENKONTIĜO DE BALTAJ MEDICINISTOJ PASVALYS 1989".

Sub la jarindiko:  unu el simboloj de Litovio, tiel nomataj fostoj (kolonoj) de Gediminas. Gediminas estis grandduko de Litovio. En la litova lingvo tiu simbolo nomiĝas *Gedimino stulpai*.

**LEA** = Litova Esperanto-Asocio

*ENA tutkore dankas sinjoron Povilas Jegorovas, ĉefdeligito de Litovio, pro liaj informoj pri la simbolo.*

## Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

68a Universala Kongreso Budapeŝto 1983







| | |
|---|---|
| Lando: Hungario | Kvanto: nekonata |
| Metalo: bronzo | Pezo: 170 g |
| Diametro: 67 mm | Medalisto: nekonata |
| Jaro: 1983 | Diko: 7 mm |

### *Averso:*

Steleto kaj majuskloj “UK” (emblemo de tiu kongreso).
Sub ornamaĵo kun speco de floreto: 1983 BUDAPEŜTO”.

### *Reverso:*

Tre larĝa, glata rando.
Surskribo: 68a
UNIVERSALA
KONGRESO
DE
ESPERANTO

## Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

Radio Polonia 100 000







| | |
|---|---|
| Lando: Pollando | Kvanto: “nur kelkaj” (H. Jankowski) |
| Metalo: latuno | Pezo: 166 g |
| Mezuroj: 88 x 65 mm | Medalisto: Jānis Strupulis |
| Jaro: 1986 | Diko: 4 mm |

### *Averso:*

Sur koverto-forma rektangula medalo: “100 000” kaj en “stampo” vertikale “1986”.
Poŝta stampo sur la jubilea simbolo de 1987, kvazaŭ poŝtmarko.
Surteksto: Radio Polonia
Esperanto-Redakcio
Varsovio
Pollando

### *Reverso:*



Sur koverto-forma rektangulo supre en stampo vertikale “WARSZAWA” kaj tute dekstre poŝta stampo.
Sube la sigelo de la medalisto. Malkutime por la medalisto: sen jarindiko!

### *Rimarko:*

Unu ekzemplero de la tre rara medalo estis donacita kiel premio al Norbert Merkens el Germanio, kiu estis la sendinto de la centmila Esperanto-letero, kiu atingis “Radio Polonia”-n.

## Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

L.L. Zamenhof 1859 – 1959







Lando: Pollando

Metaloj: -latuno
-bronzumita lat.
-arĝentumita lat.

Diametro: 70 mm

Jaro: 1959

Kvanto: “nur kelkaj” (H. Jankowski)

Pezo: latuna: 114 g
bronzumita: 116 g
arĝentumita: 117 g

Medalisto: Jozef Goslawski

Diko: 4 mm

### *Averso:*

Supre: Esperanto-steleto kun majusklo E.
Meze: surskribo antaŭ ornama fono “OMAĜE AL ZAMENHOF EN LA CENTJARA DATREVENO DE LA NASKIĜO VARSOVIO MCMLIX”



Urba blazono de Varsovio



## *Reverso:*

Granda busto de Zamenhof kaj surskribo ambaŭflanke de la busto:

| | | |
|---|---|---|
| LUDOVIKO | | AŬTORO |
| LAZARO | busto | ★ DE ★ |
| ZAMENHOF | | ESPERANTO |
| 1859 | | 1917 |

En la rando, apud 1917:

"Jozef Goslawski"



## *Rimarko 1:*

Pri la medalisto Jozef Goslawski, vidu: jk. 3, n-ro 1, p. 13

## *Rimarko 2:*

La reverso estis modelo por medalo de la urbo Sosnowiec el la jaro 2002. Vidu: jk. 5, n-ro 3, p. 9-10






latuna



bronzita




arĝentita

## Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

Honora medalo por profesoro d-ro Ivo Lapenna








Lando: Pollando

Metalo: kupro

Diametro: 61 mm

Jaro: 1984

Kvanto: nekonata

Pezo: 63 g

Medalisto: nekonata

Diko: 3 mm

### *Averso:*

Centre: granda stelo en cirklo kun majusklo “E”

Ena ĉirkaŭa skribo: “5 nov 1909  5 nov 1984 POLLANDO

Ekstera ĉirkaŭa skribo: “♦ LA HONORA MEDALO ♦
OMAĜE Al Prof. D-ro.IVO LAPENA”

## *Reverso:*

Portreta busto de Zamenhof.
Supra skribo: LUDWIKO ZAMENHOF

Suba skribo: Julio 28a – 1984 Vschova
1859 - 1917

Tute sube: "Memore de A. Racrykowski Cr. Stykowski"

## *Rimarko 1:*



Profesoro d-ro Ivo Lapenna naskiĝis la 5an de novembro 1909 en Split (Kroatio). Li forpasis en 1987 en Kopenhago. La medalon li ricevis okaze de lia 75a naskiĝdatreveno, la 5an de novembro 1984.

## *Rimarko 2:*

H. Racrykowski Cr. Stykowski: nekonataj

## *Rimarko 3:*

***La medalo estis farita per nekutima tekniko: nek fandverŝita nek stampita kiel kutime, sed teksto kaj ilustraĵo estis samtempe surpresitaj!***

## *Rimarko 4:*

Vschova= Wschowa: pola urbo.

## *Rimarko 5:*


***Ortografia eraro***: "LAPENA" >LAPEN**N**A!

## *Rimarko 6:*


Observu reverse la ornamaĵon, kiuj estis tipaj por la famega **novarta stilo** de la unuaj jardekoj de la 20a jarcento, kiu nuntempe ree ĝisvivas veran renesancon!

# *S P I K U M A Ĵ O J & S U P L E M E N T O J*







Varsovio, la 21. 11. 11.

Altestimata profesoro! Mi prokrastis la forsendon de mia letero pro timo, ke ĝi ne perdiĝu sur la limo. Nun, kiam D-ro Johnston ricevis la dokumentojn de D-ro Chyber, mi rekte forsendis mian aĵon kaj asekuris ĝin por 25 Frankoj....

Mi tre ĉagrenus, se ĝi perdiĝus, ĉar ĝi enhavas la tutan historion de la TEKA. Mi skribis detale al D-ro Rotschuh pri la detalaĵoj de lia ofico, pri helpantoj, pri propagando.

Mi nepre sendos al Vi ion por la 3a numero. La elektoj laŭ la Regularo devas okazi en decembro. Plejbone aldonu „voĉdonilon" al la 3a numero, kiel ni faris en 1909. Mi pensas, ke estus bone enmeti en la 3a num. la bonegan artikoleton de Prof Forel (el svisa med. ĵurnalo) kaj rekomendi ĝin al niaj konsuloj por propagandaj celoj. Tute Via

W. Róbin




*La medalon ni jam priskribis en la jk. 2, n-ro 3, p. 4-5*

# *A S P E K T O J   D E   N U M I S M A T I K O*

## Kalkulĵetonoj kaj samspecaĵoj

Per tiel nomataj kalkulĵetonoj, metitaj sur abakon (horizontala kalkultabulo aŭ -tuko), oni kalkulis en Eŭropo dum pli ol kvin jarcentoj. En la franca oni uzis por ĝi la terminon *jeton* (<gectoir / getone / gectoni). Tamen, kiel la angla *token*, ĝi havas diversajn signifojn, i.a. gildĵetono, ludmarko aŭ enirĵetono. En grandaj magazenoj oni ankaŭ uzis *jetons,* kiam apunto malabundis.



Nurenberga kalkulĵetono el 1553 kun bildo de abako

Sur la abakon, garnitan per horizontalaj linioj kun diversaj monvaloroj, oni surmetis ĵetonojn, eventuale ŝtonetojn ktp. Tian kalkulilon jam uzis la antikvaj romianoj, sed la kutimo malaperis dum la Mezepoko. Tamen ĝi iĝis denove populara, kiam en la 12a jarcento en Italio kaj Francio ree ekfloradis la ekonomio kaj la komerco. Ĉirkaŭ la jaro 1600a ĝi denove kaj definitive malaperis, kiam oni ekuzis aliajn teknikojn kaj paperon kun skribilo.

Kalkulĵetonoj kun monereca aspekto, plejofte emisiataj de oficialaj monfarejoj, do unue aperis en la 12a jarcento. Ekde la 15a jarcento ne nur Francio sed ankaŭ la 17 provincoj de la Malaltaj Landoj produktis la plimulton de tiaj ĵetonoj, kiuj amase disvastiĝis en Okcidenteŭropo. En la 16a jarcento Nurenbergo (Germanio) iĝis la nekontestata centro de la produktado. Du famegaj nurenbergaj *rechenpfennig*-fabrikistoj estis la familioj Lauer kaj Lauffer.

Tiaj ĵetonoj estis uzataj ĝis en la 17a jarcento, sekve ili nur aperis kiel t.n. historiaj ĵetonoj aŭ specialaj ĵetonoj por kolektantoj en la normala formato aŭ pli etaj kiel ludĵetonoj (ludmarkoj).

Ekde la komenco aperis kalkulĵetonoj kies monerfiguroj kaj surkriboj aspektis kvazaŭ veraj moneroj. Por eviti monfalsadon kaj konfuzon, sur la ĵetonojn oni metis skriban, avertan surtekston kiel “JE SVI DE LATON BEL” (“Mi konsistas el bonkvalita latuno”). En Nurenbergo la vorto “RECHENPFENNIG” estis eĉ deviga.

En la daŭro de la historio la originalaj kalkulĵetonoj, antaŭe amase emisiataj, ricevis tute novajn aplikadojn.

Reĝoj kaj aliaj potenculoj donacis ilin al favorataj korteganoj kaj al pastroj.

Kiam mankis oficialaj moneroj, oni rajtis pagi per tiaj ĵetonoj. Ke multaj el ili regule estis uzataj kiel pagilo, pruvas la eluziĝo de multaj elfositaj ekzempleroj. La nura uzo sur abako ne povas klarigi tian eluziĝon!



Nurnbergaj kalkulĵetonoj el la 16a kaj 17a jarcentoj, elfositaj kaj klare eluziĝintaj, trovitaj en la ĉirkaŭaĵo de Veurne (Belgio).

Krome, ĵetonoj estis eldonataj kun multvariaj aspektoj por satirstile rememori ekzemple fiaskajn batalojn de iu ajn nobelo, aŭ ekzemple okaze de la pereo de la hispana *armada* (militfloto) kaj aliaj mokindaj eventoj. Rare ili havis pozitivan mesaĝon, probable por lakei iun potenculon. En la lasta fazo de ilia historio ili estis uzataj nur kiel ludĵetonoj por celoj en kaj ekster la domo. Tiaj ĵetonoj – kun pli moderna aspekto – eĉ nuntempe ankoraŭ havas funkcion.




Nurenberga ludmarko (Spielmarke) el latuno, el la 19a jarcento.

En la historio de la Esperanto-numismatiko evidente ne ekzistis kalkulĵetonoj, tamen troviĝas kelkaj prapranepoj, nome la du nuraj – ĝis hodiaŭ retrovitaj – aluminiaj konsumadĵetonoj el la 20a jarcento kun la vorto ESPERANTO (priskribitaj en jk. 2, n-ro 1, p. 9-10). La plastaj, diverskoloraj ĵetonoj, uzataj nuntempe en la t.n. Gufujo dum gejunulaj renkontiĝoj, pruvas ke ili ankaŭ hodiaŭ havas funkcion kaj valoron (vidu jk. 5, n-ro 3, p. 15-17).

Fonto:*Historische rekenpenningen in de Nederlanden,*Wikipedia, 04.08.2018


- Feuardent, *Jetons et Méreaux*, Paris 1904-1915
- Mitchiner, *Jetons, medalets & tokens*, London 1988-1991
- Barnard, F.P., *The casting-counter and the counting-board*, Oxford 1917
- Gebert, C.F., *Die Nürnberger Rechenpfennigschlager*, "Mitteilungen der Bayerischen Numismatischen Gesellschaft" (1917) 74-80 / 80-102
- Dugniolle, J.F., *Le jeton historique des 17 provinces des Pays Bas*, Bruselo, 1876/1880
- *Encyclopedie van munten en bankbiljetten*, Samson, deel 2, S p. 112

## *M E D A L I S T O J*

# 14. Riccardo Rossi (1911 -1983)



Riccardo Rossi naskiĝis kaj mortis en la itala urbo Massa, ĝemela urbo de la germana urbo Bad-Kissingen.

Li estis famega skulptisto kaj tre lerta medalisto. En 1930 li finstudis en la Instituto de Arto "Felice Palma" en Massa. Sekve li studis en la Belarta Akademio de Kararo.

Kiel subleŭtenanto li batalis en Orient-Afriko kaj krome dum la dua mondmilito.

En 1950 li daŭrigis la studadon en la Arta Akademio de Perugia. Poste li laboris ĝis 1967 kiel estro en la Instituto de Arto en Massa. Dum la sepdekaj jaroj li estis profesoro pri skulptado en la Akademio de Kararo.

Li ricevis la ordenojn "Commendatore" kaj "Cavaliere del Cardo".

Rossi kreis ankaŭ belegan Esperanto-medalon okaze de jubileo de la ĝemeliĝo de Massa kaj Bad Kissingen en 1960.




Priskribita en jk. 5, nr-o 3, p. 6
*Multan dankon al nia membro Elda Dörfler pro la informoj pri la medalisto.*


# *H I S T O R I A J   A S P E K T O J*










**M.C. Escher 1928**









# La babela turo en la (esperanta) kulturo

## A. Antikvaj ziguratoj

Laŭ PIV zigurato estas “Grandega turo, kun ŝtupoj, ordinare sep, ĉiu pli malvasta ol la malsupra, servinta kiel templo en Babilonio”.



## B. La babela turo

Jen do instigo por surgrimpi unu el la plej simbolaj mondkulturaj artefaktoj de la homa historio. Ĝi estas famega pro la multegaj pentraĵoj, kiuj dum pli ol 2000 jaroj ornamis templojn kaj preĝejojn, kaj ilustris i.a. manuskriptojn kaj librojn. La kunligita mito estis konata dise en Eŭropo el la “Malnova testamento”.

En la antikva tempo la mito pri la babela turo estis la tiama klarigo de la fakto, ke diversaj popoloj kaj kulturoj havas diversajn lingvojn, pro kio la homa specio ne sukcesas efike interparoli kaj interkompreniĝi. Tiu sama fakto, konstatebla eĉ por la infano Ludoviko en sia naskiĝurbo Bjalistoko, estis instiginta lin por junaĝe ekkompili komunan duan helpolingvon por la homaro.

Malgraŭ la abundo de bildoj kaj ilustraĵoj en la belartoj (ĉefe en la pentroarto) bildoj de ziguratoj aŭ de la babela turo mem estas sufiĉe raraj en la ĝeneralaj filatelo kaj numismatiko, same en la esperantaj…!

Belega belga Esperanto-poŝtmarko, eldonita en 1982 okaze de la UK en Antverpeno, inspirita de mondfamaj pentraĵoj de la flandra, genia artisto Petro Bruegel la Maljuna (1525-1569), estas vere unikaĵo, almenaŭ en la katalogoj pri esperantaj filatelaĵoj.






En la Esperanto-numismatiko ekzistas ĝis nun probable nur unu tiatema artefakto, la belega israela medalo el la jaro 2007, kiun ni priskribis en jk. 4, n-ro 2, p. 4.







Estas strange – eĉ ne klarigeble strange–, ke la temo de la babela turo, kiu tamen estas intense ligita al la ideo de la Internacia Lingvo kiel solvo de la problemo de lingvaj konfuzoj, ŝajne apenaŭ ricevis kaj ricevas atenton en la kulturo de Esperantujo. Kial?

Ĉu ekzistas konfuzo ĉe certaj esperantistoj pri la rolo de Esperanto rilate al la solvo de tiu problemo? Ekzistas ja pluraj, kiuj opinias, ke Esperanto ne nur solvu la lingvajn konfuzojn, sed ankaŭ helpu detrui, forigi la t.n. babelan turon de la mito, ĉar la kaŭzo de la tiama konfuzo estus la kolero de la dio el la "Malnova testamento", kiu jam antaŭe forpelis el la paradizo Adamon kaj Evon pro la malhumileco (aŭ kuraĝo?) de la praparo, kiu ignoris la dian malpermeson pluki fruktojn de la "arbo de scienco". Aliaj, eble pli maldogmemaj esperantistoj, volas tamen interpreti la konstruadon kiel simbolon de pli progresema, monda komunumo, i.a. pere de komuna lingvo kiel Esperanto. Ili opinias, ke la homaro daŭrigu flankenŝovi la dion de la "Malnova testamento", kiu punis la homan specion, strebantan konkeri la ĉielon, kiel faris en multe pli antikva kulturo Prometeo, kiu ŝtelis la fajron de la dioj por helpi la homaron, tute kontraŭ la volo de la (grekaj) dioj.

Daŭrigota

# P O R   S P U R E M U L O J !

*En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj aŭ pri kies detaloj ni scias malmulte aŭ preskaŭ nenion! Celo de ĉi tiu rubriko estas: rikolti per via helpo plejeble multajn informojn por kompili plejeble kompletan katalogon.*

**9a enigmo**




*Al kiuj (historiaj) personoj apartenas la du inaj vizaĝoj, kiuj eble estas simboloj de la urboj Massa kaj Bad Kissingen?*

*Sur la kroneto de la maldekstra virino troviĝas la nomo RAKOCZY, nomo de iama fama, nobela gento el Hungario. Kial?*

# *T E R M I N A R O*

## *Alfabeta listo (15)*

**Apunto:** *etvaloraj moneroj uzataj kiel ŝanĝmono.*

**Falpremilo:** *monerpremilo funkcianta per bloko (de almenaŭ 50 kilogramoj) kun tute sube monerstampilo, kiu – post tirlevo – falas sur anticipe metitan metaldisketon.*

**Kalkulĵetono:** *maldika, moneraspekta disketo kun diametro inter 22 kaj 25 mm. El bronzo aŭ latuno (okaze de specialaj eventoj foje el arĝento), kiu kiel la bidoj de globkalkulilo estis uzata por kalkuli per abako (tabula aŭ tuka). Tre malofte farita ankaŭ el eburo.*

**Kalkulmonero:** *termino por valuto sen konkretaj moneroj, kiel la valutsistemo "spesmilo" de Ferdinand de Saussure.*

**Koncentreja mono:** *t.n. "doma mono", speciale fabrikita por militkaptitejoj, internigejoj kaj koncentrejoj. Kutime papermono, sed ankaŭ aliaj surlokaj pagiloj cirkulis. La celo estis malebligi la uzadon de oficiala mono kaj tiel fiaskigi eskapprovojn.*

**Ludkarteca mono:** *speco de kriza mono, uzata pro la sufiĉe rezistega materialo. Konataj estas ekzempleroj el la iama franca kolonio Kebekio (Kanado, 1685) Krome dum la 1a mondmilito uzitaj en germanaj komunumoj.*

**Monernekrozo:** *malapero de moneroj el la moncirkulado. Eblaj kaŭzoj: kunporto fare de eksterlandanoj (ekz. turistoj); perdo ie ajn, refando, materialo por ornamoj, stakado kaj forgeso, kelktempa stakado en aŭtomatoj ktp.*

**Novjara ĵetono:** *monero aŭ moneraspekta objekto, mendebla ĉe oficialaj monfarejoj por disdonaci okaze de novjaro.*

**Numismatika lingvistiko:** *scienco, kiu studas la lingvokrean povon de mono kaj samtempe la originon kaj la evoluon de vortoj kun signifo rilate al mono kaj valoro.*

**Potino:** *alojo konsistanta el variigebla konsisto de kupro, zinko, stano, plumbo kaj arĝento. Uzita de la romianoj en krizaj epokoj, por fabriki monerojn kun malaltaj titro kaj valoro.*

**Reprezenta monero:** *monero celanta ne moncirkuladon sed reprezentadajn celojn, ekzemple novjarĵetonoj.*

**Venusĵetono:** *en la 16a jarcentoaro de ĉefe nurenbergaj kalkulĵetonoj kun bildo de nuda virino, faritaj surbaze de nederlandaj kalkulĵetonoj de ĉ.1488 kun nederlandlingva devizo: "Nuda Vero".*

## *E L  L A  G A Z E T A R O*

# Lokaj monunuoj kontraŭ transnaciaj entreprenoj

*Komunumaj valutoj, kiuj jam hodiaŭ estas uzataj en diversaj landoj kaj regionoj, por subteni sociajn aŭ ekologiajn projektojn, mondvaste ekmarŝus.*

En Belgio aktuale estas fondata neprofitcela asocio: Muntuit. Iu kiu deziras ekzemple lui urban ĝardeneton en la kvartalo Raboto de la urbo Gento, rajtas pagi per loka valuto.

Loka monunuo ŝajnas esti renesanco de mezepokaj monunuoj, kiam ĉiu urbo administris la propran valutosistemon. Tamen, la nuntempaj projektoj ŝajnas tute ne utopiaj.

Du kvartaloj en la universitata urbo Gento jam uzas proprajn valutojn, la tiel nomatajn "turetoj"-n kaj "plumoj"-n. Sed, kontraŭe al urbaj valutoj, ili celas realigi ne ekonomiajn sed sociajn projektojn.

Post la komunumaj elektoj en oktobro 2018, la urbo Gento mem emisios propran valuton – provizore sennoman –, kiu cirkulos kune kun la eŭro, kaj havos la saman valoron. Tiu urba valuto fariĝu konsciigilo, por progresigi la lokan ekonomion. La urbaj "moneroj" estas emisiataj de oficialaj bankoj, ĉar la projekto tute ne estas kontraŭleĝa, male.

La plej grava kialo ja estus laŭdire, ke la profito de la lokaj entreprenistoj estus profunde minacata de la kreskanta sukceso de la cifereca komerco, de la transnaciaj entreprenoj kaj de la grandegaj ĉenentreprenaroj.

Por ke urba projekto ne fiasku, gravus krei nur ciferecan valuton. Se oni emisius verajn monerojn, ili tre verŝajne malaperus en tirkestoj aŭ en kolektoj de numismatoj.

Avantaĝo de loka valuto –flanke de la oficiala eŭro – estus i.a., ke tiel estiĝus granda loka reto, en kiu la monunuo libere cirkulus kaj tiel stimulus la lokan komercon.

Ekologia avantaĝo estus la plietiĝo de la "ekologia spuro": la ĉeno mallongiĝus, ĉar oni evitus longvojajn transportojn de varoj. Ĝi ankaŭ stimulus la lokan laborigon.

Tial la urbanoj gajnus pli da urba valuto, kiujn ili denove povus investi en la propra kvartalo. Tiel la cirklo estus fermita!

Fonto: la belga altkvalita gazeto "De Morgen", 29.03.2018, p.7,
30.03.2018, p.2

**R E T P O Ŝ T O**

de vi por ni!

# Reagoj kaj konversacioj

*14.07.2018 11:52*

*Kara Jozefo!*

*Saluton! Mi esperas, ke vi fartas bone kaj havos iom da tempo por ENA. Mi sufiĉe frue sendas al vi la korektendan revuon, ĉar mi partoprenos en la UK en Lisbono kaj volas antaŭ mia foriro jam dissendi la novan numeron. Do, bonvolu, se eble korekti ĉion kio eskapis al miaj okuloj.*

*Mi deziras al vi kaj via familio agrablajn somerajn feriojn!*

*Amike,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*23.07.2018 10:17*

*Karaj individuaj kaj asociaj membroj de ENA!*

*Dum la 2018a Universala Kongreso en Lisbono vi kaj ni havos unikajn okazojn interkonatiĝi aŭ revidi unu la aliajn.*

*Kiel okaze de la 100-jariĝo de la Universala Kongreso en Francio partoprenos ŝultro ĉe ŝultro la filatelista fakgrupo ELF-AREK kaj nia numismata fakgrupo ENA dum la Movada Foiro, sabaton, la 28an de julio ekde la 19a horo. Ĉe la ĝemela stando 69 ni atendos vin.*

*Dum la UK okazos ankaŭ komuna kunsido, renkontiĝo en la salono Nguyen en la 2a etaĝo, ĵaŭdon la 2an de aŭgusto ekde la 15a ĝis 16.30a horoj. Evidente ankaŭ viaj geamikoj, gefamilianoj kaj gekonatuloj estos bonvenoj. Venu amase!*

*Ni interŝanĝos novaĵojn, ideojn, sugestojn … pri objektoj kaj la agado de ambaŭ ĝemelaj fakgrupoj. Elda Doerfler kaj mi mem tutkore bonvenigos vin kaj restos dum pli ol unu horo je via dispono!*

*Samideane kaj amike,*

*Bert Boon*

*Iniciatinto de ENA*

25.07.2018 17:55

Salutojn!

Dankon pro la invito. Ni ne povos renkonti unu la alian, ĉar mi ne partoprenos UK-n. Tamen mi ĝojus, se vi raportus pri ĝi. Antaŭdankon.

Elkore kaj amike,

Adri

*10.08.2018 20:39*

*Saluton Adri!*

*En la oktobra numero mi raportos pri la agado kaj la rezultoj de ENA.*

*Amike kaj numismatike,*

*Bert*

11.08.2018 7:58

Saluton kara Bert!

Dankon. Ni atendos ankaŭ tiun numeron. Gratulojn kaj multe da sukceso!

Amike,

Adri

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*28.08.2018 09:23*

*Saluton, Antoine!*

*Kun ĝojo ni bonvenigas vin kiel 105an individuan membron kaj* **unuan senegalan membron de ENA**. *Baldaŭ vi ricevos la lastan numeron kaj poste senpete la novajn. Se vi deziras ankaŭ ricevi en via komputilo (ĝi devas esti sufiĉe forta!!!) la 18 jam aperintajn numerojn, bonvolu jese respondi.*

*Kie vi legis pri ENA kaj Elf-Arek?*

*Ĉu vi konsentas informi viajn esperantajn samideanojn kiel afrika ambasadoro de ENA? Multan dankon, se jes!*

*Amike kaj numismatike,*

*Bert Boon*

28.08.2018 19:53

Saluton.

Estas por mi granda plezuro ke vi akceptas min kiel unuan senegalan kaj la cent-kvin-dekan membron de ENA. Jes mi konsentas kun volonto informi miajn esperantistajn samideanojn kiel afrika ambasadoro. Sed mi ŝatus - kiel vi prave diris - ke vi donu al mi kelkajn informojn pri ĉi tiu movado. Mi estas instruisto en elementa lernejo por infanoj de mia urbeto. Atendante vian reagon mi deziras al vi bonan vesperon.

Antoine

30.08.201813:54

Saluton.

Jes mi deziras kiel vi demandis al mi ricevi numerojn sur mia komputilo, sed la problemo estas, ke mi ne ankoraŭ havas ĝin. Do por povi konekti, mi devas iri ĉe Cyber Cafe .Tie mi aĉetas tempon. Mi estas ankaŭ tre feliĉa esti elektita kiel afrika ambasadoro. Mi tenos miajn esperantistajn samideanojn informitaj pri ĉi tiu movado.

Antoine

*31.08.2018 15:27:15*

*Kara Antoine,*

*Aldone mi sendas al vi la lastan numeron (jarkolekto5, numero3). Mi volonte sendus al vi ankaŭ la jam aperintajn numerojn, sed ili ampleksas 18 numerojn, do entute 510 paĝojn A4. Mi pensas, ke la komputilo de la Cyber Cafe ne estas sufiĉe forta, ĉu? Ĉu vi eble havas alian sugeston?*

*Pri ENA vi trovos informojn je la fino de la al vi sendita numero (Varbilo). Se vi ankoraŭ havas aliajn demandojn, bonvolu sciigi al mi!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

31.08.2018 19:52

Kiom granda estas mia ĝojo legi viajn mirindajn vortojn kiujn mi ricevis en tre bonegaj kondiĉoj kaj kies enhavo estas tre bone kaptita. Kiel vi prave diris la komputilo de la Cyber Cafe estas ne sufiĉe forta por ĉi tiu volumeno. Do mi devas pagi por printi tiujn paĝojn, se mi intencas havi ilin. Mi estas ankaŭ tre feliĉa pro via sendo pri ENA. Kara kial vi kreis ĉi tiun movadon kaj kio estas ĝia celo?

Antoine

*31.08.2018   22:25*

*Kara samideano, kara ambasadoro de ENA!*

*Mi esperas, ke vi ankaŭ sukcesis malfermi la aldonon. En la lasta teksto vi povas legi kial mi fondis ENA-n kaj kiaj estas la celoj de la fakgrupo.*

*Mi esperas, ke iam vi havos propran, fortan komputilon por ricevi ĉiujn numerojn de la revuo kaj ke vi povos entuziasmigi aliajn esperantistojn en Senegalo aliĝi al ENA. Fine de oktobro vi ricevos la novan numeron!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert (< Albert)*

03.09.2018 19:45

Saluton.

Kiel vi prave diris, mi ankaŭ esperas, ke iam mi havos fortan komputilon kiu kapablos ricevi ĉiujn numerojn pri kiuj vi parolis. Kara Bert mi ne scias ĉu vi jam partoprenis en universala esperanto-kongreso. Mi intencis en 2015 kiam ĉi tiu grava esperanto - evento devis okazi en Francio, sed pro la vizo - afero mi ne ĉeestis. Do mi perdis mian tutan monsumon kiun mia esperantista amikino pagis por mi. Mi forgesis unu dokumenton kiam mi pretis meti mian vizo-peton al la germana ambasado, ĉar mi devis ankaŭ partopreni en IJK Internacia Junulara Kongreso en Wiesbadeno. Nun mi estas preparanta por la venonta UK, kiu okazos en Finnlando en 2019. Kara Bert, mi kredas ke en la mezo de ĉiu tiu monato mi kunvenos kun aliaj senegalaj esperantistaj samideanoj.

Antoine

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

01.09.2018 2:36

kara：

Mi konsentas aliĝi al la asocio kaj mi legis la interesan gazeton de ĝi.

Mia nomo estas Sun Minĝiao （Semio en Esperantujo）

naskiĝtago：1964-03-01

profesio：oficisto de la universitato,respondeculo de Esperanto-Muzeo en Zaozhuang-a Universitato

Ĉu la informo estas sufiĉa？

Sincere,

via Semio

*01.09.2018   23:02:00*

*Kara samideano,*

*Ni dankas kaj bonvenigas tutkore la Esperanto-muzeon en Zaozhuang-a Universitato kiel 21an asocian membron de ENA. Ni supozas, ke vi konsentas ankaŭ ricevi la 18 jam aperintajn numerojn de "Esperanta Numismatiko", por ke la kompleto povu esti je la dispono de ĉiu studento de la Universitato. Bonvolu tion konfirmi en via respondo.*

*Ni estas scivolemaj ricevi regule informojn pri la agado de via muzeo, precipe pri esperanta numismatiko en Ĉinio.*

*Ĉu eble en via lando ekzistus aliaj muzeoj, bibliotekoj aŭ universitatoj kiuj interesiĝus ricevi nian revuon?*

*Amike kaj numismate,*

*Bert Boon por ENA*

05.09.201802:47

kara：

Kompreneble ni volas ricevi la 18 jam aperintajn numerojn de "Esperanta Numismatiko".Se mi estos libera, mi konigas informojn pri ĉina numismatiko

Ni kontaktu regule。

via Semio

*05.09.2018   10:11*

*Kara nova membro!*

*Jen aldone en sekvaj mesaĝoj la jam aperintaj numeroj. Bonvolu konfirmi la ricevon. Agrablan legadon!*

*Bert por ENA*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*31.08.2018   15:11*

*Kara nova membro!*

*Dum la UK en Lisbono vi SENPAGE aliĝis al Esperanto-Numismatika Asocio (ENA). Kiel iniciatoro kaj ĉefredaktoro de "Esperanta Numismatiko" mi dankas, gratulas kaj bonvenigas vin.*

*Vi ricevas nun aldone la lastan numeron (majo-junio-julio 2018) kiel provnumeron kaj ekde oktobro 2018 ĉiun trimonatan novan numeron.*

*SE VI DEZIRAS, ni povas sendi al vi ankaŭ senpage ĉiujn jam aperintajn numerojn (entute 18). En tiu kazo bonvolu resendi jesan respondon!*

*Amike kaj numismate,*

*Mag. Bert Boon*
*Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)*
*Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"*
*Fakdelegito pri numismatiko*

03.09.2018 11:17

Kara Bert,

Dankon pro la majo-julia numero de "Esperanta Numismatiko"! Mi atente legos ĝin! Mi ĝoje ekkonos la plurajn belajn medalojn kaj monerojn de esperantujo!

Respondante vian demandon, jes, mi ŝatus ricevi ĉiujn jam aperintajn numerojn. Dankon!

Amike,
Daniel Gonçalves

*06.09.2018 19:07*

*Kara Daniel!*

*Mi forgesis demandi al vi permeson por publikigi en la venonta numero vian foton kaj mencii kaj honori vin kiel 100an membron de ENA. Mi komprenus kaj respektus, se vi ne konsentus!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert Boon*

07.09.2018 11:01

Saluton,

Jes, vi povas publikigi ĝin. Mi fieras esti la 100a membro!

Amike,
D.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*03.09.2018   16:41*

*Kara samideanoj!*

*Ni kune interparolis ĉe via informa stando en la akceptejo de la lisbona UK, i.a. pri la enhavo de ĉi proponletero aldonita. Mi esperas, ke mia instigo estos fruktedona kaj naskos novan perlon por krono de esperanta numismatiko!*

*Mag. Bert Boon*
*Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)*
*Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"*
*Fakdelegito pri numismatiko*

04.09.2018   01:30

Kara Bert,

Dankon pro via afabla mesaĝo! Certe, fari medalon estos en nia konsidero. Ni iomete parolis kun vi dum la UK -- mi scivolas, ĉu estos malfacile por vi sendi al ni iom pli da informoj -- kiuj estas la materialoj rekomendataj, la grandoj, ktp. Esence, ni ŝatus ricevi liston de rekomendoj aŭ aferoj por konsideri en tiu projekto (do, ĉion, kion vi pensas estus utile por ke ni sciu / pripensu). Estus bele ankaŭ havi la ideon pri la vendoprezoj de medaloj kaj eventuale la referenco pri kio estus la prezrango (depende de kvalito, materialo, ktp.) por fari malnetan buĝeton (kompreneble, ni informiĝos ankaŭ de nia flanko). Estus ankaŭ bone scii pri la sukcesaj dezajnoj. Kiu estas la kutimo por dezajno? Do, ekzemple, logotipo funkcius kiel dezajno sur unu flanko? Iuj ajn aldonaj informoj estos aprezataj. Dankegon!

Amike,

Ĵenja Amis

*22.09.2018   11:22*

*Kara samideaninoj,*

*Jen aldone al mia vidpunkto inda strategio por farigi memormedalon okaze de la 105-a UK en Montrealo.*

*Amike kaj numismate,*

*Mag. Bert Boon*
*Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)*
*Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"*
*Fakdelegito pri numismatiko*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*03.09.2018 13:48*

*Kara samidean(in)o!*

*En Lisbono mi havis la plezuron interparoli ĉe la informostando kun kunlaborontoj de la UK en Lahti pri la enhavo de mia propono. Bonvolu legi ĝin kaj sendi al mi reagon. Mi anticipe dankas vin!*

*Mag. Bert Boon*
*Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)*
*Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"*
*Fakdelegito pri numismatiko*

04.09.2018 17:40

Ni estas interesitaj pri medalo por UK en Lahti. Mankas al ni informoj pri la detaloj: kiu povus/pretus desegni medalon, kiu produkti? Kiom da medaloj necesus produkti kaj je kiu prezo haveblus ili? Mi (ni) estas tre dankemaj pri viaj praktikaj konsiloj. Baze de ili ni povos decidiĝi pri mendo.

Kun amikaj salutoj,

Paula Niinikorpi
EAF-estrarano kaj LKK-ano por Lahti

*22.09.2018 11:11*

*Jen aldone al mia vidpunkto inda strategio por farigi memormedalon okaze de la 104-a UK en Lahtio.*

*Amike kaj numismate,*

*Mag. Bert Boon*
*Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)*
*Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"*
*Fakdelegito pri numismatiko*

*28.09.2018 16.17*

*Kara samideanino,*

*Ĉu vi bonorde ricevis mian proponon pri strategio por farigi medalon? Bonvolu konfirmi!*

*Amike kaj numismate,*

*Mag. Bert Boon*

28.09.2018 15:30

Kara,

Jes, bonorde alvenis viaj konsiloj. Pardonu, ke mi ne tuj reagis. Ni momente pripensas la eblecojn realigi la medalon.

Amike,

Paula Niinikorpi

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

06.09.2018 17:02

Kara Bert!

Mi ĵus legis en iu 2017-numero de la ĉina revuo esperanta "Tra la Mondo" pri via asocio numismata. Mi ege ŝatus aliĝi al ĝi.

Mi estas tute blinda kaj mi estas 70-jara. Mi blindiĝis tute, kiam mi estis 11-jara. Tamen mi jam naskiĝis kun problemoj en miaj okuloj. Feliĉe mi havis bonajn edukajn kaj laborŝancojn. En mia profesia vivo mi estis tre aktiva en la internacia organizo por antaŭenigi la socian inkluzivecon de blinduloj ĉie en la mondo. De 1986 ĝis 2000 mi deĵoris kiel ĝeneralsekretario de la Tutmonda Unuiĝo de Blinduloj. Mi scipovas plurajn lingvojn kaj mi vizitis 99 landojn.

Kvankam mi tute ne vidas, ĉar mi multe vojaĝis, mi decidis kolekti monerojn. Mi havas nun monerojn el pli da 100 landoj. Ĉiuj moneroj estas purigitaj kaj bone ordigitaj.

Mi ege ŝatus aldoni al mia kolekto esperantrilatajn monerojn. Mi ne sciis, ke ekzistas tiaj aĵoj.

Tutkore,

Pedro

*07.09.2018 11:09*

*Kara Pedro!*

*Kun ĝojo kaj en la nomo de ENA mi bonvenigas vin kiel 106an individuan membron. Mi dankas vin pro via sufiĉe malkonciza memprezento, kiu montras al mi aktivan kaj kuraĝan samaĝulon (mi naskiĝis la 30an de majo 1948). Se vi eventuale volus informojn pri mi, bonvolu serĉi en Google sub "Flandraj esperantistoj".*

*Via rimarko, ke vi ne sciis ke ekzistas esperantaj numismatikaĵoj (vi ne estas sola!), estis unu el la kialoj kiu instigis min fondi la novan fakgrupon.*

*Mi aldone – kiel provnumeron – sendas al vi la lastan numeron. Fine de oktobro aperos la nova, samtempe lasta numero de la 5a jarkolekto.*

*Mi estas sincere scivolema kiel vi sukcesas legi tekstojn kaj imagi ilustraĵojn.*

*Laŭpete mi povas sendi al vi la 18 jam aperintajn numerojn (entute 47 285 kB), sed vi do bezonas sufiĉe fortan komputilon.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

07.09.2018 11:40

Kara Bert!

Mi ege dankas vin pro via rapida respondo. Mi konscias, ke mi skribis numismata, anstataŭ "numimastika".

Mi fakte naskiĝis la 12-an de februaron 1948.

Mi povas plenumi sendepende multajn taskojn en la komputilo, sed mi devas fronti taskojn, iuj estas por mi tute nealireblaj, ekzemple grafikaĵoj, fotaĵoj, ilustraĵoj. Mi ankaŭ regule profitas la kunlaboron de amikoj, kiuj vidas bone.

Mi klopodos legi la lastan numeron de via asocio, sed príncipe mi ne aspiras al la legado de ĉiuj viaj publikaĵoj. Mi ne estas tre sperta numismatikulo, kvankam mi havas sufiĉe bonan kolekton de moneroj.

Mi sentas min konvinkita esperantisto kaj mi do ege ŝatus aĉeti kelkajn esperantrilatajn monerojn. Ĉu estas rimedo por koni kion mi povus trovi sen la legado de ĉiuj numeroj de via revuo?

Amike,

Pedro

*07.09.2018 14:15*

*Kara Pedro!*

*Mi komprenas, ke vi ne povas aspiri legi ĉiun artikolon en la revuo, sed el via respondo mi ne povas konkludi ĉu mi jes aŭ ne sendu al vi la aperintajn numerojn…*

*Se vi volas akiri esperantajn numismatikaĵojn, mi povas rekomendi kontakti Walter Klag el Vieno, kiu antaŭ nelonge eldonigis belegan, esperantan arĝentan moneron-medalon. Jen lia retadreso: esperanto@chello.at. Sukceson!*

*Kiam aperos novaĵoj, mi informos vin!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

07.09.2018 16:09

Kara Bert!

Mi skribos al Walter Klag, ĉar mi ege ŝatus tiun arĝentan esperantrilatan moneron.

Momente ne sendu al mi la antaŭajn numerojn de via revuo. Mi havas tre multe da materialo por legi. Antaŭ kelkaj jaroj, ni blinduloj havis vere limigitajn eblecojn por legi aŭ brajle aŭ en voĉregistritaj libroj. Feliĉe nun kun novaj teknologioj oni sukcesas legi preskaŭ ĉion.

Amike,

Pedro

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

26.09.2018 8:35

Kara Bert!

En Monato 8-9/2018, paĝoj 21-22, aperis artikolo pri René de Saussure kaj la 100 Steloj.

Elkoran saluton!

Walter

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

**A N O N C O J**

**&**

**E V E N T O J**

# Raporto pri la 103-a UK en Lisbono (28.07 - 04.08. 2018)

Kiel kutime, la programo de la Universala Kongreso estis riĉa kaj abunda. Oni komence do devas serĉi la vojojn en la ĝangalo, sekve elekti sian propran itineron.

Sabaton, la 28an de julio, la ununura grava programero estis la tradicia Movada Foiro. En tro eta salono, multe pli ol 100 fakgrupoj kiel rafanetoj en fasko (eta tableto por 3 ĝis 4 grupoj!) povis tamen prezenti sian agadon en Esperantujo. Ŝultre ĉe ŝultro la prezidanto de ELK-Arek (Elda Doerfler) kaj la iniciatoro de ENA dum pli ol unu horo informis, babilis kaj … ŝvitis! Tamen, la du ĝemelaj fakgrupoj havis pli ol unu sagon en la sagujo: por la dua de aŭgusto estis anoncita per afiŝo de Elda komuna kunveno de filatelistoj kaj numismatoj. Por proksimume dudek interesiĝantoj Elda kaj Bert sekve prelegis pri diversaj aspektoj de la du fakgrupoj. Post la kunveno spontane vizitantoj kaj prelegintoj interbabilis, kaj foje nova membro aliĝis al iu el la du asocioj.










Posta babilado



Parto de la publiko dum la prelegoj



Tamen kongresejo bonŝance ne nur estas laciga laborejo, sed ankaŭ amuzejo. Kelkaj aktivecoj situis ekster la kongresejo, ĉar okazis diversaj ekskursoj en kaj ekster Lisbono. Tre speciala evento estis la mirinda koncerto sur fama lisbona placo de nia belga samideano kaj elstara kariljonisto Jo Haazen. Li ludis dum preskaŭ unu horo per kariljono muntita sur speciala kamiono. Ne nur la esperantistoj, sed ankaŭ multaj lisbonanoj admiris la virtuozecon de nia Jo Haazen.



Jo Haazen koncertas

Preskaŭ ĉiun tagon ni povis dorloti niajn orelojn en iu el la diversaj salonoj de la rektorejo de la Fakultato pri Juro aŭ en la salonego "Koloseo" en la centro de Lisbono. Aperis ne nur diversaj artistoj dum la Arta Vespero, sed okaze de la tradicia Nacia Vespero diversaj folkloraj grupoj el Portugalio kantis kaj dancis por ege entuziasma publiko.

Reaperis ankaŭ la "propraj" esperantujaj unuopaj aŭ grupaj artistoj.



Kajto



Georgo & Dominika Handzlik



Danci kun jOmO!

Bert

**Esperantokursoj en Vieno, Aŭstrio**

Ekde januaro 2014 okazas unu aŭ du fojojn en la monato unuhoraj Esperantokursoj por ĉiuj, kiuj ankoraŭ ne havas konojn de la Internacia Lingvo. La loko de la renkoniĝtoj estas la kafejo Schopenhauer [ŝopenhaŭer] en la 18a distrikto de Vieno, proksime de multaj universitatoj. La varbado por tiuj kursoj okazas per afiŝoj, kiuj pendas en la enirejoj de la universitatoj. Tial la partumantoj estas preskaŭ nur junaj homoj inter 15 kaj 35. Multaj gestudentoj estas ne aŭstroj, sed ili regas la germanan lingvon. Ĝis nun okazis 58 kursoj kaj venis pli ol 200 gestudentoj. Unufoje en la jaro okazas premia konkurso por tiuj partumantoj. La premioj estas Esperanto-moneroj, ekzemple la arĝenta 100-stela monero (2018) kaj aliaj.


Por daŭrigi la lernadon, okazas dufoje en la monato regulaj renkontiĝoj en picejo en la 15a distrikto de Vieno.




Mag. Walter KLAG
Ĵurnalisto kaj eldonisto- La Bulteneto
Fakdelegito de UEA por numismatiko

René de Saussure-Jaro 2018
https://eo.wikipedia.org/wiki/Rene_de_Saussure

# Itala Kongreso 2019 en Triesto




**LOĜADO**

Antaŭvidita estas tranoktado en pluraj hoteloj el diversaj kategorioj, aŭ ankaŭ B&B-hoteloj, situantaj urbocentre. En la kongresejo mem eblos antaŭmendi tagmanĝon.

**PROGRAMO DE LA KONGRESO**

Plurtagaj seminarioj, gvidataj de kompetentaj fakuloj, estas la ĉefelementoj de la programo karakterizanta la italajn kongresojn. La kongresa temo estos: "**Multkulturismo kaj plurlingvismo hodiaŭ**", kiu estos pritraktata per prelegoj kaj ene de diskutgrupoj. Kompletigos la programon prelegoj kunlabore kun kongresanoj el pluraj landoj, kiuj estas invititaj jam de nun al propono de interesaj temoj. La prelegontoj rajtos aliĝi senpage al la kongreso.

Krome okazos diversnivelaj lingvokursoj kaj prezentado de la novaj eldonaĵoj aĉeteblaj ĉe la libroservo.

Kio ankoraŭ? Ekspozicioj pri Esperanto kaj L. L. Zamenhof, koncertoj, spektakloj, diversaj itineroj tra la urbo kaj ties ĉirkaŭaĵoj, plus ekskursoj en Friulo Juli-venetio.

**ORGANIZA KONGRESA KOMITATO**

Konsistas el:

Michela Lipari
Edvige Tantin Ackermann
Elda Doerfler
Riccardo Lamperti,

kun la helpo de multaj aliaj kunlaborantoj.

**kongreso@esperanto.it**

# Varbilo por ENA!

**Karaj membroj!**

**Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!**

**Bert**

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo "Esperanto-Numismatika Asocio" (ENA) kun revuo "Esperanta Numismatiko" en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum malpli ol kvin jaroj ĝis 108 individuaj membroj kaj 20 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable por ĉiuj estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: "Mi konsentas aliĝi"). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi LAŬPETE tuj ricevos perrete ankaŭ ĉiujn jam aperintajn kaj senpete sekve ĉiujn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA 2018 sur p. 66-67. Se vi dezirus pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be!

## Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon
Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de "Esperanta Numismatiko"